# Biografieto


| | |
|---|---|
| 1931 | Naskiĝo en Merano, Suda Tirolo, Italio. |
| 1940 | La familio Oberhuber devis translokiĝi al Innsbruck en Norda Tirolo pro kontrakto inter la faŝismaj Germana Regno kaj Italio. |
| 1945-1949 | Vizito de metia lernejo, fako skulptado, en Innsbruck. Kontakto kun la moderna franca arto. Unuaj abstraktaj desegnoj, neformalaj skulptaĵoj kaj literaturaj verkoj. |
| 1952 | Unua ekspozicio de propraj verkoj, nome skulptaĵoj kaj grafikaĵoj. |
| 1960 | Edziĝo al Elisabeth Hohenbruck; tri infanoj el tiu geedziĝo. |
| 1961 | Realigo de la Moderna Galerio en Innsbruck. |
| 1962-1965 | Grandegaj memportretoj „Mi kiel Infano“ kaj „Dentobildoj“.<br>Sekve multaj ekspozicioj, fondo de arta gazeto. |
| 1973 | Arta gvidanto de la fama „Galerio Proksime de la Katedralo Sankta Stefano“ en Vieno (ĝis 1979), kaj profesoro en la Akademio por Figura Arto en Vieno. |
| 1979-1995 | Oberhuber estas rektoro de la Universitato por Figura Arto en Vieno. |
| Ekde 1982 | Multaj ekspozicioj en Aŭstrio kaj eksterlande; diversaj premioj. |
| 1983 | Edziĝo al Rosemarie Schwarzwälder (ekde 1978 ŝi gvidas la aferojn de la „Galerio Proksime de la |

Oberhuber estas unu el la plej influhavaj artaj personecoj en Aŭstrio. 300 objektojn el lia verkaro – la plej granda ekspozicio tia ĝis nun - montris la muzeo 21er Haus (Aktuale „Belvedere 21“) en Vieno 2016:
Neformalaj skulptaĵoj, desegnaĵoj, pentraĵoj, muntobildoj, grandaj laboraĵoj sur lino kaj tiel plu.

## Ideologio de daŭra ŝanĝo

„Oni ne kreu stilon. Ĉiu bildo estu io nova. Iam venas rutino kaj vi scias la rezulton. Kiam mi sentis tion, mi enuis.“
Tiun principon de daŭra transformado Oswald Oberhuber sekvis ne nur kiel artisto, sed ankaŭ kiel ekspozicia organizanto, galeriisto kaj universitata profesoro.
Kvankam Oberhuber proklamis la „ideologion de daŭra ŝanĝo“ li produktis ankaŭ seriojn kaj lukris tiel multe da mono. Pri tio li parolis en la muzeo „Belvedere 21“.

Germanlingva prelego de Oswald Oberhuber en muzeo 21er Haus (aktuala nomo „Belvedere 21“):
Vortrag von Oswald Oberhuber im 21er Haus, 24. April 2016:
https://www.youtube.com/watch?v=0mh2Ir06Dqc




Oswald Oberhuber: Nombroj, 1952.
Universalmuseum Graz, Neue Galerie.

Ekde 1948 nombroj kaj literoj/skribo okupadis la artiston. Li rigardis ilin – speciale la nombrojn – kiel formojn; la seria aŭ ripetada uzo de tiuj formoj gravis por Oberhuber en lia kreado de Nombraj Bildoj kaj de Skribitaj Bildoj. Por fari bildon el literoj/skribaĵo li enkadrigis fortoplenan tekston per abstrakta formo. Literoj de skribita vorto pere de enkadrigo iĝis formala valoro. Kutime skribita vorto pli multe valoras pro enhavo ol pro formo. Sed la formo ja gravas ekzemple en kaligrafia teksto de Ekstrema Oriento, kaj ankaŭ en la arto de Informel.  La artiston interesis la formo de skribaĵo kaj la rigardo al teksto precipe kiel bildo. El serio de tiaj skribitaj bildoj li faris tiel nomatajn bildromanojn. Laŭ la artisto oni memkompreneble povas ankaŭ legi kaj pensi pri la enhavo de iu „teksta bildo“. „Skribitaj Bildoj“ kaj „Nombraj Bildoj“ prezentas esencan kaj fundamentan verkaron de Oswald Oberhuber.

Informel: Termino por diversaj stiloj de abstrakta (negeometria, senobjekta, neklasika) arto. Informel estas vorto, kiu karakterizas kunan artistan sintenon, sed neniakaze kunan artistan stilon.

En la haltejo Landstraße [landŝtrase] de la viena metrolinio U3
Oswald Oberhuber dezajnis unu longan vandon en la jaro 1989.
Ĝi estu kontrasto al la ĉiutaga vivo.
Oni vidas gajajn figurojn de ludemaj bestoj.






Naskita 1931 en Merano (Suda Tirolo). Fondinto de la neformala plastiko.
1958 Fondinto de la Daŭra Ŝanĝo en la Arto.
Ekspozicioj en Aŭstrio kaj eksterlande ekde 1952.
Ekde 1973 profesoro en la Altlernejo por Aplikita Arto.
1979-1987 Rektoro de tiu alternejo.
Ekde 1987 Direktoro de la Instituto por Muzeologio.

